

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Niaj Planoj

([KK]=nia kutima kunvenejo, nome Kanagawa-Kenmin-Senta, proksime de la Stacidomo Jokohama)

*jul.28 [KK] Speciala klaso

(kvazaŭ Hama-Ronda Vespero) konatiĝo kaj interparolo kun belgaj esperantistoj, s-ro Bart Demeyere kaj lia 18-jara filo Thomas. Ili dum japana vojaĝo tranoktos ĉe s-ro Tanigawa de nia rondo. Ilia sinprezento aperis en nia junia numero.

*sept.1 [KK] Prezento de spertoj

Niaj rondanoj parolos Esperante pri sia sperto precipe en la somero, ĉu pri Esperanto, ĉu pri aliaj temoj.


*sept.8 [KK] La 112a Legokunsido

Diskutota estas pri “La nanoj en domo kun granda zerkovo”.

Okazis

*jun.16 [KK] Hama-Ronda Vespero

Esperantlingva prelego de s-ino Ueno Yuriko de Esperanto-Klubo de Maĉida. Ĉeestis 26 personoj, inkluzive de 8 el Urbo Maĉida. La prelega temo estis: “Partopreninte en la 9a Tutamerika Kongreso de Esperanto”. Tiu kongreso okazis en Kubo en februaro 2018, kaj s-ino Ueno vizitis ĝin kun alia japana esperantistino. Ŝi unuafoje vizitis Kubon en 2010 okaze de UK, ĉi-foje ŝi povis fari pli intiman rilaton kun kubaj geamikoj. Cetere laŭ ŝi, la lando lastatempe fariĝis ekonomie prospera.



Por la venonta Legokunsido

Pri la tema libro, tradukita de s-ino Itabaŝi Micuko, anticipe prezentas s-ino Aida Yayoi.

Kortuŝa kaj Kleriga

Aida Yayoi

recenzo pri la libro, “La nanoj en domo kun granda zerkovo”, originale verkita de Inui Tomiko en 1959, esperantigita de Itabaŝi Micuko en 2017, eldonita de JEI en 2017, 208p. prezo ¥1200

Kun granda admiro kaj dankemo mi finlegis ĉi tiun libron tradukitan de s-ino Itabaŝi Micuko. Ĝi ja estas ĉarma libro kun amindaj ilustraĵoj. Renkonti ĝin estis mia ĝojo. Mi deziris pli multo da legantoj prenu la libron kaj gustumu la

fantazion teksitan de reala familia vivo kun nanoj havantaj homan personecon. Ili vivis pace konsiderante unu la alian eĉ en la malfavoraj cirkonstancoj. Sinsekvaj epizodoj prilumas interese pecojn de tiu rara kunvivado, precipe rilate al la amindaj nanoj. Sed ĉi tiu libro ne estas nur simpla fabelo. Sub la vesto de fabelo kaŝas sin grava temo, t.e. la malhumana vivo devigita de japana militismo dum la Dua Mondmilito. La afero korŝute pensigos legantojn kiel la familianoj kaj eĉ la nanoj postvivis kuraĝe eltenante la malfacilan situacion.

Ĉar s-ino Itabasi kaj mi estas en la sama

Hama-rondo, mi sentis iusencan devon recenzi la tradukaĵon. Bedaŭrinde nenie aperis tiaj artikoloj ĝis nun. Kvankam mi ne meritas recenzi, se mia komento iom utilis por disvastigi la libron, mi estus ferîĉa.

Hontinde ĝis mia tralego de ŝia tradukaĵo, mi ne interesîĝis pri la japanlingva originalo, nek havis sufiĉe da kono pri la verkisto Inui Tomiko. La originalo mirigis min. Kun granda simpatio mi legis, kaj bone komprenis kial s-ino Itabaŝi volis traduki ĝin Esperanten.

Laŭ mi ĉarmo de majstra verko de originalo

kondukas la tradukaĵon al pli ol okdek procentoj da sukceso. Kompreneble mi ne neas persistan klopodon de s-ino Itabaŝi. Ŝia Esperanto legeblas facile kaj komforte kun eĉ ritmo en iu ĉapitro. Bedaŭrata s-ino Inui Tomiko sendube benos sian verkon renaskitan en la formo de Esperanta lingvo.

Resume, tiu ĉi familia rakonto kun nanoj estas kortuŝa, interesa, kleriga. Mi aldone rekomendas la eseon en la fina paĝo, "Foto de tennoo" verkita de la tradukinto mem. Ĝi bone spegulas la siatempan atmosferon.

La 111a Legokunsido

En la 2a de junio ni havis la 111an legokunsidon por "Gvidlibro pri Jokohamo kun eseoj hamalogiaj, 2017" de Mevo-Libroj. Partoprenis kvar personoj.

Grandpaŝa Tramarŝo en Jokohamo

Mizro Iwaya

Tiu ĉi libro rakontas ĉion rilate Jokohamon. Ĉu troigo? Sed vi ne povos trovi detalan epizodon tiurilatan el la libro alia ol tiu ĉi. Do mi rekomendas al vi legi ĝin antaŭ aŭ post la vizito al Jokohamo.

Duono el la libro estas dediĉita al kutimaj klarigoj pri vidindaĵoj. Tiu enhavo sekvas la planon adoptitan en ĝiaj antaŭaj versioj. Fakte tiu ĉi gvidlibro estas la tria versio de la gvidlibro pri Jokohamo, sed komplete reviziita! Do vi povas havi plej lastan informon pri la vidindaĵoj en Jokohamo per tiu ĉi libro.

Alia duono estas pri diversaj konoj pri Jokohamo, alinome (joko)hamologio. Vi povas scii la historion, aktivadon kaj aliajn interesajn trajtojn de la urbo Jokohamo, kiuj karakterizas tiun unikan libron kaj kiuj mankis (aŭ malsufiĉis) en niaj antaŭaj versioj.

Verdire, ankaŭ mi "parteton" prenis en la verkado. Por tiu celo mi iris al mia najbara kampadejo kaj fotis kurantan rostobankedon. Alitempe mi atendis la alttajdan matenon por enmanigi foton de svarmo da konkulĉasantoj sur forfluinta plaĝo. Vi povas scii per la libro ke tiaj naturaj aktivadoj tute nature eblas kaj faratas ankaŭ en Jokohamo, granda urbo.

Tiu ĉi estas la rezulto de nia kolektiva laboro. Do mi atendas ke vi trovos laŭplaĉe ian ĉarmon de Jokohamo. Se vi estos interesita, do iam ĝin vizitu kaj certigu tion per viaj propraj okuloj.

La Gvidlibro 3-ageneracia

Sibayama Zyun'iti

1. Kio karakterizas tiun ĉi novan gvidlibron?

Jen temas pri la Gvidlibro pri Jokohamo eldonita en la lasta jaro de ni, la rondanoj de Jokohamo. Tiu ĉi libro fakte estas la 3-a libro siaspeca, kaj sube mi montras la kreskon.

(1-a) "Gvidlibro pri Jokohamo, havenurbo nova kaj malnova", 1995, okaze de la 82-a Japana Esperanto-Kongreso en Jokohamo. 36 paĝoj, kun fotoj nigre-blankaj. 600 enoj.

(2-a) "Jokohamo, havenurbo nova kaj malnova kaj Kamakura, ĉefurbo antikva", 2005, okaze de la 92-a Japana Esperanto-Kongreso en Jokohamo. 85 paĝoj, kun fotoj koloraj. 750 enoj.

(3-a) "Gvidlibro pri Jokohamo, kun Eseoj hamalogiaj, 2017", 2017, okaze de la 104-a Japana Esperanto-Kongreso en Jokohamo. 205 paĝoj, kun fotoj koloraj. 1900 enoj.

Komparante la paĝonombron ekskluzive de enhavtabelo, kolofono ktp, ni akiras jenan skemon:

(1-a) : (2-a) : (3-a)

1 : 2,5 : 6

Kaj el tio, pure gvidlibra parto (inkluzive de fotoj kaj mapoj), estas:

1 : 2 : 4

Krome, la libro havas ne-pure gvidlibran parton, nome parton de eseoj, kantoj, kronologia tabelo ktp, pri kio ni akiras jenan skemon:

0 : 0,5 : 2

Nome, triono de tiu ĉi 3-a generacia libro estas okupita de eseoj ktp. La eseoj estas nomataj ‘hamologio’, t.e. ‘studo pri Jokohamo’. Tiu konsisto plej bone karakterizas tiun ĉi novan libron disde la antaŭaj, mi opinias. Eseoj aŭ temas pri socia kaj historia flankoj de la urbo, aŭ temas pri gastronomiaj kaj trink-amantaj flankoj.

Sed ankaŭ la pure gvidlibra parto ja duobliĝis de la 2-ageneracia libro. La ĉefa kaŭzo de tio estas plimultigo de la gvidataj lokoj. En tiu ĉi nova libro, ne nur la klasika urbocentra parto, sed ankaŭ sufiĉe foraj lokoj estas menciitaj, kiel nova zoo, stadiono ktp.

Nu, permesu ke ĉi-foje mia prezento estas farata ĉefe de la eldonista flanko, sed ne de la flanko de pura leganto, ĉar mi ja implikiĝis en la entreprenado de la libro-eldonado.

Kaj tiusence ni devas peti pardonon al la legantoj, ke ofte la lingvaĵo ne estas polurita,

kun malsufiĉaj vortumoj kaj misoj. Ni devus havi pli longan tempon por sarki la malglataĵojn.

2. kiel loĝanto en periferia distrikto de la urbo

Mi jam loĝadis pli ol 30 jarojn, aŭ en Jokohamo aŭ en la najbara urbo Kamakura, kaj konas multajn lokojn en la urbo. Sed mi devas konfesi, ke leginte aŭ la manuskripton, aŭ la binditan libron, ankoraŭ estas multaj lokoj ne-vizititaj, aŭ multaj faktoj ne-konataj. Kelkajn ekzemplojn mi menciuj. Mi konas la Hotelon Intercontinental, ĉar ĝi apudis al la Kongresejo de la 92-a Universala Kongreso en Jokohamo, sed ne konis pri Statuo de diino ‘Michibiki’ ĉe la hotela muro (p.94). Mi konas ŝtalan artan objekton, kiu ornamas la kovrilon de la 1-ageneracia gvidlibro, sed ne konis, ke ĝi estas nomata “Mokumoku Wakuwaku”, el japanaj onomatopeoj. Tial eĉ por jokohamaj loĝantoj, tiu ĉi libro alportos ion novan.

La Poŝtoŝicejo por Drivintaj Aĵoj

Estas tre rara poŝtoŝicejo, kiu ne portas poŝtaĵojn de unu persono al alia: poŝtoŝicisto ne transportas poŝtaĵojn, sed nur konservas ilin en la poŝtoŝicejo. Sur la ŝildo de la poŝtoŝicejo estas skribita “Poŝtoŝicejo por Drivintaj Aĵoj”. En la akceptejo oni ekspozicias multajn ornamaĵojn el konkoj, ŝtonetoj kaj vitroj, kiuj atingis la bordon de la insuleto post drivado. En la centro de la poŝtoŝicejo troviĝas tablo okangula kun ĉ. du-metroj da diametro. Ĝi turniĝas, kaj sur ĝi estas ladaj skatoloj, kiuj nun enhavas ĉ. tridek milojn da poŝtaĵoj (poŝtkartoj kaj leteroj) el la tuta lando: letero al si, kiu adiaŭis sian pasinton, aŭ al la nova bopatro malamata, aŭ pri la espero al <internacia lingvo>, aŭ pri raporto pri sia edz(in)iĝo, al la forpasinta avo amita ktp.

“La Poŝtoŝicejo por Drivintaj Aĵoj” akceptas kaj konservas poŝtaĵojn sen ricevontoj, kaj do la poŝtaĵoj drivas en la poŝtoŝicejo. Oni tutkore skribas leterojn aŭ poŝtkartojn al diversaj homoj: forpasintaj infanoj, gepatroj, amikoj, amatoj nun foraj, tamen oni ne sendas ilin al la veraj adresitoj sed lasas ilin en la Poŝtoŝicejo. Nun la Poŝtoŝicejo konservas la poŝtaĵojn. Ĉiu letero kaj poŝtkarto enhavas apartan volon. Skribante la poŝtaĵon la skribanto ordigas sian penson aŭ volon. Tamen neniu respondas al la poŝtaĵoj

adresitaj al la Poŝtoŝicejo. Estas ja feliĉe ke oni povas skribi poŝtaĵon al vera kaj reala ricevonto.

La Poŝtoŝicejo troviĝas en la insuleto Aŭaŝima en la maro Setouĉi inter Ŝikoku kaj la distrikto Ĉuugoku. La insuleto apartenas al la urbo Mitojo en la gubernio Kagaŭa, nordorienta parto de Ŝikoku. De la haveno de Suda en Mitojo oni povas iri tien per ŝipeto veturante nur 15 minutojn. Tie loĝas malpli ol 300 homoj. La ŝipo veturas tage nur ok fojojn iro-kaj-revene.

Antaŭe ĝis 1991 la poŝtoŝicejo efektive funkciis kiel ordinara poŝtoŝicejo en Japanio, sed verŝajne pro malmultiĝintaj loĝantoj oni fermis la poŝtoŝicejon kaj ĝi estis lasita sen vizitantoj. Oni revivigis la poŝtoŝicejon alimaniere. En 2012 s-ino Kubota Saja, fakulo pri moderna arto, trovis drivintajn aĵojn sur la marbordo de la insulo kaj la forlasitan poŝtoŝicejon. Ŝi ekpensis fari artaĵon “La Poŝtoŝicejo por Drivintaj Aĵoj” por Internacia Arta Festivalo en 2013, kiu okazis printempe, somere kaj aŭtune en diversaj lokoj en Setouĉi: 12 insuloj kaj ĉirkaŭoj de du havenoj. Per tiu artaĵo ŝi partoprenis en la festivalo aŭtuna, kiu finiĝis sukcese. En la festivalo en la insulo Aŭaŝima ĉeestis 32,412 homoj, vere granda nombro kompare kun la loĝantoj en la insulo.

Tamen eĉ post la festivalo oni esperis daŭre havi la

poŝtoŝefoj, kaj do ŝi klopodis efektiviĝi la revon. Nun oni malfermas la poŝtoŝefojn du-foje monate. La oficejestro estas eksa estro nun 84-jaraĝa.

“Se vi vivus, nun vi estus 30-jara. Kia vi fariĝis? Mi volas vidi vin, vidi vin... Denove mi volas brakumi vin!” Ĉi tio estas adresita al la filo forpasinta antaŭ 20 jaroj.

“Danke al vi mi povis fariĝi patrino!”

Nun, en la tago de malfermo, vizitas la poŝtoŝefojn ĉirkaŭ cent homoj.

Oni scenarigis novan dramon baze de la Poŝtoŝefo por Dirivintaj Aĵoj. La dramo estas nomita “Pepa Luno”, kiu estas la nomo de la kafejo. En la teatraĵo la ĉefa aktorino skribas leteron al la forpasinta edzo kaj sendas al la Poŝtoŝefo por Dirivintaj Aĵoj. La Teatra Grupo “Mingei” prezentis la teatron en junio.

Karaj legantoj, ĉu ankaŭ vi volas skribi poŝtoŝefojn al la poŝtoŝefoj?

(Doi Ĉieko)

Opinio

Propono por investado de niaronda mono

NAMBA Fumiharu

Lastamonte, en la kunsido de niarondaj komitatanoj, oni proponis pri investado de nia mono. Fakte, nia rondo Esperanto Jokohama havas iom grandan amason de “enoj” en nia bankokonto.

Dum multaj jaroj ni ŝparis monon por futura granda entrepreno. Tamen, ankoraŭ ne venas tempo por uzi tion. Tial ni planas investadon kaj volas gajni profitan monon por helpi ĉiutagajn agadojn.

Nun, estas grava temo. Al kiuj kompanioj ni investu nian karan kapitalon? Por nuntempa investanto, la koncepto “ESG” (angle: Environment, Social, Governance) jam multe famiĝis kaj graviĝis. Multaj homoj kaj investado-kompanioj multigas sian investon al “bonaj” kompanioj kiuj, ekzemple, protektas medion de nia terglobo, klopodas solvi diversajn socialajn problemojn, daŭrigas siajn regadojn al la kompanioj mem pli bone kaj juste. Dume investantoj malmultigas investadon al “malbonaj” kompanioj kiuj detruas medion, daŭre produktas armilojn, ktp.

Konsiderante tiun koncepton, mi pensas kaj volas jene...

Ni estas Esperantistoj, kaj ni volas prosperigi internacian komunikadon kaj rezulte pliiĝi mondan pacon. Tial, se ni volas komenci investadon, ni investu al pli bonaj kompanioj laŭ tiu vidpunkto. Ekzemple, ni investu subtenu kompaniojn...

...kiuj helpas kaj subtenas internacian komunikadon.

...kiuj protektas diversecon pri lingvoj kaj kulturoj.

...kiuj tiamaniere klopodas realigi pli pacan mondon.

Krome, se ekzistas, ni volas ankaŭ investi al tiuj, kiuj rekte subtenas Esperanto-movadon! Do, ĉu ĉi tiu opinio pri “esperantista investado” estas bona? Ĉu ni povos trovi taŭgajn kompaniojn por nia investo-plano?

Tial, ni deziras ricevi viajn diversajn opiniojn. Se vi havas demandon aŭ komenton, bonvolu sendi al nia rondo! Ni petas.

EĤE EL 3ZZZ

En nia maja n-ro ni skribis ke la aŭstralia radiostacio 3ZZZ estas “komputila”. Al kio reagis 3ZZZ kaj komentis, ke ĝi ne estas tia. Ĝi ja disaŭdigas el Melburno, kaj poste enstokigas la materialon, kion ni feliĉe povas sekvi interrete. Pardonon pro nia miskoncepto.

Cetere el nia maja numero, la tradukita novelo “Songho” estis voĉlegita de 3ZZZ en la disaŭdigo je la 18a de junio.



Nekrologo: s-ro Koyama Takesi

1933-03-19 / 2018-06-16

S-ro Koyama Takesi lastatempe forpasis pro pulmito. Li eklernis Esperanton en nia rondo en majo 1989. Ekde 1991, li aliĝis ĉiujare al la Universala Kongreso por 25 jaroj, kaj lia laste vizitita UK estis la 100-a UK en Lillo.

En lia loĝurbo Acugi li plurfoje okazigis Esperantan kurson.